

IpI 58-59 (3-4/2006)

Enhavo

1	Pasintaj aranĝoj	2
1.1	91-a Universala Kongreso: Sciencaj aranĝoj	2
1.1.1	Konferenco 100 jaroj ISAE.....	2
1.1.2	Konferenco pri Bruno Migliorini	2
1.1.3	59-a Sesio de Internacia Kongresa Universitato	4
1.1.4	Esperantologia konferenco.....	4
1.1.5	Terminologia Forumo.....	5
1.2	KAEST 2006: „Lingvoj kaj la Interreto“	5
1.3	Esperanto dum la 37-a konferenco de „Gesellschaft für Angewandte Sprachwissenschaft“ (GAL)	6
1.4	16-a konferenco de la Societo pri Interlingvistiko	6
1.5	Esperanto en kongreso pri la hispana civitana milito	7
2	Estantaj aranĝoj.....	7
2.1	Lingvistika konferenco en la Universitato de Kaunas.....	7
2.2	Globalization and Communication: Enrichment and Threat	7
2.3	17-a konferenco de GIL en Berlin pri bibliotekoj kaj arkivoj	9
2.4	Simpozio pri „Perspektivoj de Esperanto“ en Den Haag	9
3	Interlingvistiko kaj Esperanto en Universitatoj	9
3.1	Doktoriĝo de Marcus Sikosek/Ziko van Dijk.....	9
3.2	Interlingvistika kurso en la Sankt-Peterburga universitato	11
3.3	Interlingvistika sesio en Poznano kun publikaj prelegoj por neesperantistoj	11
3.4	Bakalaŭreco de Duin	11
3.5	Oficialaj Esperanto-Kursoj en la Universitato de de Kalifornio.....	12
3.6	Esperanto en universitatoj de Liaoning, Ĉinio	13
3.7	Litovaj rektoroj.....	14
3.8	Internacia superrigardo pri Esperanto en universitatoj.....	14
4	Honorigoj kaj personaj bibliografioj	15
4.1	Werner Bormann okaze de lia 75-jariĝo	15
4.2	Ronald Löttsch okaze de lia 75-jariĝo	19
4.3	Aleksandr Duliĉenko okaze de lia 65-jariĝo.....	21
4.3.1	Mia vojo al interlingvistiko (<i>Aleksandr Duliĉenko</i>)	21
4.3.2	Eldonaĵoj honore al la jubileulo	23
4.3.3	Bibliografio de interlingvistikaj verkoj de Aleksandr Duliĉenko	23
4.3.4	Pri A.D. Duliĉenko	31
4.3.5	„Interlingvistiko por ĉiuj“ de Duliĉenko	32
4.4	Interlingvistikaj verkoj de LIU Haitao.....	32
5	Constantin Dominte (1944-2006).....	35
6	Esperanto en usona bibliografio de literaturoj kaj lingvoj (<i>Humphrey Tonkin</i>)	36

1 Pasintaj aranĝoj

1.1 91-a Universala Kongreso: Sciencaj aranĝoj

Kiel ĉiujare tiel ankaŭ en 2006 okazis kelkaj sciencaj aranĝoj antaŭ aŭ dum la Universala Kongreso, ĉi-foje lige al la 91-a, de 29-a de julio ĝis 5-a de aŭgusto en Florenco/Italio. Ni nur mencias kelkajn interlingvistike gravajn aranĝojn.

1.1.1 Konferenco 100 jaroj ISAE

Jam de la 24-a ĝis 28-a de Julio 2006 en la itala urbeto Tavoleto okaze de la 100-jariĝo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) okazis scienca konferenco, kiun organizis en sia kasteleto la prezidanto de ISAE, prof. d-ro Rüdiger Sachs.

Ĉiuj prelegoj tie prezentitaj jam aperis en la kajeroj de Scienca Revuo 1-4/2006.

Interlingvistike aparte interesaj estas la jenaj:

- *Haszpra, Ottó* (2006): Egalrajteco kaj ekonomieco en la internacia komunikado. En: Scienca Revuo 57, Nr. 204 (1/2006), p. 15-22
- *Blanke, Wera* (2006): Kiam estiĝis ISAE? En: Scienca Revuo 57, Nr. 206 (3/2006), p. 118-126
- *Vergara, José Antonio* (2006): La ŝanĝiĝanta interrilato scienco-socio: koncernoj por ISAE en la 21-a jarcento. En: Scienca Revuo 57, Nr. 206 (3/2006), p. 127-140.
- *Kavka, Josef* (2006): Vojaĝe kun ISAE. En: Scienca Revuo 57, Nr. 206 (3/2006), p. 148-152
- *Barandovská-Frank, Věra* (2006): Planlingvaj samtempuloj: „Scienca Gazeto“ kaj „Schola et Vita“. En: Scienca Revuo 57, Nr. 206 (3/2006), p. 153-176.
- *Frank, Helmar* (2006): Kial kaj kiel enfiltri la Internacian Lingvon en la sciencon. En: Scienca Revuo 57, Nr. 207 (4/2006), p. 179-201
- *Čižikaitė, Aida* (2006): La vokala sistemo de la litova lingvo kaj Esperanto. En: Scienca Revuo 57, Nr. 207 (4/2006), p. 210-223

1.1.2 Konferenco pri Bruno Migliorini

La italo *Bruno Migliorini* (1896-1975) estis unu el la plej gravaj lingvo-sciencistoj. Li estis prezidanto de la fama itala lingvo-kultura akademio „Accademia della Crusca“. Liaj historio de la itala lingvo („Storia della lingua italiana“, Firenze: Sansoni, 1960) kaj vortarego de la itala lingvo (kun C. Capuccini: „Vocabolario della lingua italiana“, Torino: Paravia, 1946) ankaŭ nuntempe apartenas al la bazaj verkoj de la itala lingvo-scienco.

Migliorini ankaŭ estis aktiva esperantisto; kelkajn jarojn eĉ vicprezidanto de la Akademio de Esperanto. Li i.a. verkis lernolibron de Esperanto por italoj („Manuale di Esperanto“, S. Vito al Tagliamento: Paolet, 1924, 128 p., represo 1995 kaj 1998). Liaj ĉefaj esperantologiaj eseoj antaŭ nelonge aperis:

Migliorini, Bruno (2006): *Lingvaj aspektoj de Esperanto. (Unua eldono 1985). Pisa: Edistudio, 112 p.*

Raporto pri la konferenco memore al Bruno Migliorini

Laŭ la anoncoj disenditaj en la unua duono de 2006 la Akademio de Esperanto (AdE), kunlabore kun la Akademio de la Itala Lingvo (Accademia della Crusca), kun la Universitato de Florenco kaj kun la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS), aranĝis la 28-an de julio 2006-a de la 9-a ĝis la 17-a horo sciencon konferencon memore al sia iama vic-prezidanto, *Bruno Migliorini*, profesoro en la universitato de Florenco kaj prezidanto de la Akademio de la Itala Lingvo.

La temo de la konferenco estis: “*Vojoj de interlingvistiko: de Bruno Migliorini al la nuna tempo*” kaj ĝi okazis en la salono Comparetti de la Universitato de Florenco, Fakultato pri Beletro, Piazza Brunelleschi, 3-4, Florenco.

Enkondukajn vortojn prezentis la prezidanto de la Akademio de Esperanto, *Geraldo Mattos*, *Francesco Sabatini* (la prezidanto de la Akademio de la Itala Lingvo) kaj *Ida Zatelli*, reprezentanto de la rektoro de la universitato. ,

Krome salutis aparta honor-gasto, *Paolo Migliorini*, la filo de Bruno, mem profesoro en itala universitato.

Laŭ la programo la unua interveno estis tiu de *Carlo Minnaja* (AdE, AIS kaj Universitato de Padova, Italujo) pri „Bruno Migliorini en la fruaj tempoj de sia esperantista vivo“. La ĉeestantaro, proksimume 60 personoj, aparte interesiĝis pri detaloj de la korespondado de Migliorini kun interlingvistoj de tiu tempo kaj pri detaloj de lia vivo. Interalie esperantistaj gazetoj de la periodo antaŭ la unua mondmilito atestas pri la rapideco, per kiu la 16-jaraĝa Migliorini ellernis Esperanton: la 14an de januaro 1913 li vizitis sian unuan prelegon pri Esperanto kaj nur 10 tagojn poste oni informis en la itala E-revuo, ke li instruas Esperanton.

Sekvis *Fabrizio Pennacchietti* (AIS kaj Universitato de Torino, Italujo) per tre teknike lingvistika prelego pri „Lingvistika pripensado pri la prepozicioj de Esperanto ekde Bruno Migliorini“.

Kaj poste laŭ la antaŭvidita programo *Humphrey Tonkin* (AdE, AIS kaj Universitato de Hartford, Usono) „Hamleto en Esperanto“, *Geraldo Mattos* (Universitato Uniandrade, Brazilo) „Fundamento de Esperanto: limoj kaj timoj“, *Mukunda Phatik* (Universitato de Katmanduo, Nepalo) „Komparo inter Esperanto kaj la malsamaj lingvoj de Nepalo“, *Aleksander Melnikov* (Akademio de Agrikultura Maŝinkonstruado en Rostov, Rusujo) „Lingvokulturologiaj aspektoj de Esperanto“, *Mauro La Torre* (AIS kaj Tria Universitato de Romo, Italujo) „Ottetti kaj bitokoj“, *Giordano Formizzi* (Universitato de Verono) „La kulturaj radikoj de Esperanto“ *Amri Wandel* (AdE, AIS kaj Universitato Hebrea en Jerusalemo, Israelo) „Esperanto en scienco en la interreta epoko“ kaj *Renato Corsetti* (AdE, AIS kaj Universitato “La Sapienza”, Romo, Italujo) „La manlibro pri Esperanto de Bruno Migliorini – sukceso dum 70 jaroj trans la aliroj kaj modeloj pri lingvoinstruado“.

La lastmomenta neĉeesto de *Tullio De Mauro* (Universitato “La Sapienza”, Romo, Italujo), kiu tamen sendis sian referaĵon „Migliorini. Homo, lingvisto kaj esperantisto“, kaj de *Nico Sica* (Universitato “Bicocca” de Milano, Italujo), kiu tamen sendis sian resumon pri „Inter logiko kaj matematiko – Ĉe la radikoj de la interlingva planado“, permesis ankaŭ ioman debaton, en kiu vigle partoprenis la reprezentanto de la universitato *Ida Zatelli*, kiu mem estas profesorino pri la hebrea, kaj bone informita pri la procedoj de transformiĝo de skriba lingvo al “normala” lingvo.

La laboroj okazis en la itala kaj en Esperanto. Prelegantoj en Esperanto plejmulte estis donintaj siajn materialojn anticipe, kaj tiuj estis liveritaj en skriba formo al la itallingvaj partoprenantoj. Prelegantoj en la itala estis surloke tradukataj al Esperanto fare de *Michela Lipari*. Sama sinsekva interpretado okazis ankaŭ dum la debatoj.

Oni planas aperigi la aktojn de la stud-tago en aparta libro kaj ankaŭ utiligi la unuopajn kontribuojn por sciencaj revuoj.

Por certa tempo ili restas videblaj en la paĝaro: <http://host.uniroma3.it/laboratori/laat/miljorini06>

Estas aparte dankindaj pro la kunlaboro dum la organizado, *Mauro La Torre* (ĝenerala planado kaj ret-paĝaro), *Michela Lipari* (tradukado de la tekstoj), *Carlo Lorenzini* kaj *Ranieri Clerici* (praktikaj surlokaj aranĝoj kaj surbendigado de la prelegoj), *Fabrizio Pennacchietti* (kontaktoj en la universitato de Florenco) kaj *Leonardo Savoia*, prezidanto de la Itala Lingvistika Asocio, kiu rolis kiel kunliganto kun la universitataj instancoj.

1.1.3 59-a Sesio de Internacia Kongresa Universitato

Kadre de la 91-a UK la Internacia Kongresa Universitato okazigis sian 59-an sesion. Rektoro estis la arabisto *prof. d-ro Fabrizio A. Pennacchietti* (Universitato Turino).

Oni prezentis jenajn prelegojn:

<i>Dr. Věra, Barandovská-Frank</i> (DE)	Akademioj, lingvoj kaj planlingvoj
<i>Prof. Dr. Geraldo Mattos</i> (BR)	La ideologio de Esperanto en la originalaj poemoj de ĝia kreinto ¹
<i>Dr. Hans Eichhorn</i> (DE)	Pri la perforto en historio kaj nuntempo de la psikiatrio
<i>Prof. Dr. Fabrizio Pennacchietti</i> (IT)	Propono klasifiki la prepoziciojn de Esperanto
<i>Eva Bojaĝieva</i> (BG)	Lipida metabolo. Kolesterolo – miskomprenoj kaj realeco
<i>Gerrit Berveling</i> (NL)	Kio fakte estas la nova renesanco?
<i>Prof. Dr. Mauro La Torre</i> (IT)	Ĉu komputilo helpas komprenon?
<i>Dr. Iván Bujdosó</i> (HU)	Vortstatistika teksto-esploro de konstituci-propono de Eŭropa Unio
<i>Sun Dachen</i> (CN)	La Ĉina <i>Libro pri Ŝanĝoj</i> kaj aplikado de ĝiaj pensoj al la mondo

La volumo kun la prelegoj haveblas ĉe UEA.

1.1.4 Esperantologia konferenco

La tradicia esperantologia konferenco estis preparita kaj gvidita de Bertilo Wennergren. Ĝi okazis la 3-an de Aŭgusto 2006.

Jen la prelegoj:

Mauro La Torre „Trafosante bitokojn“ (pri problemoj renkontataj en la prilaborado de granda retpoŝta mesaĝaro)

Marc Bavant „Proverboj: uzoj kaj interpretoj“ (per-Interreta esploro)

¹ Temas pri ideoj kaj idealoj de la iniciatinto (ne „kreinto“) de Esperanto, kiujn li esprimis en siaj originalaj poemoj. Esperanto kiel lingvo ne povas havas ideojn aŭ idealojn. Tiujn havas la unuopaj esperantistoj resp. la lingva komunumo. Pri tio i.a. vidu *Tonkin, Humphrey* (2006): *Lingvo kaj popolo*. Rotterdam: UEA.

Blanke, Detlev (2006): *Sprachenpolitische Aspekte internationaler Plansprachen. Unter besonderer Berücksichtigung des Esperanto*. En: *Blanke, Detlev/ Scharnhorst, Jürgen* (2006, Eld.): *Sprachenpolitik und Sprachkultur. Beiträge der gemeinsamen Tagung des Vereins zur Förderung sprachwissenschaftlicher Studien e.V. und der Gesellschaft für Interlinguistik e.V. am 29. Oktober 2005 in Berlin sowie der 15. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 28.-30. Oktober 2005 in Berlin*. Interlinguistische Informationen. Beiheft 13. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e. V., p. 133-170.

Andreas Kuenzli „Revoj kaj iluzioj en ret-projekto“ (pri la portalo www.plansprachen.ch)

Aida Čižikaitė / Daiva Aliūkaitė „Uzo de nomoj en retbabilejoj“

Bertilo Wennergren „La Tekstaro de Esperanto“ (Interreta helpilo por esperantologoj)

Estas planite eldoni la aktojn de la konferenco.

1.1.5 Terminologia Forumo

La tradicia terminologia formumo realiĝis kiel podia diskuto sub la gvido de *Marc Bavant*.

Ĝi koncernis problemojn de la faka lingvo en la ĉiutaga komunikado. Oni diskutis ekzemplojn de faklingvaj problemoj en la Esperanto-redakcio de Radio Varsovio (*Barbara Pietrzak*) kaj en tradukoficejo de revizia kortumo de Eŭropa Unio (*István Ertl*). En la podia diskuto ankaŭ partoprenis *Detlev Blanke*.

1.2 KAEST 2006: „Lingvoj kaj la Interreto“

De la 10-a ĝis 12-a de Novembro 2006 en Dobřichovice ĉe Prago okazis la 5-a Konferenco „Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko“ (KAEST), organizita de la entrepreno KAVA-PECH de d-ro Petro Chrdle.

La prelegantoj traktis jenajn temojn:

Marek Blahuš (CZ) Unikodo – la Esperanto de Interreto

Aida Čižikaitė (LT)/ *Daiva Aliūkaitė* (LT)
Uzo de nomoj en retbabilejoj: principoj de elekto

Pavla Dvořáková (CZ) Multlingvaj tradukvortaroj en Interreto

Alla Kudryashova (RU) Lingvo de retaj reklamo kaj merkatico

Clayton Smith (CA)/ *Peter Baláz* (SK)
E@I²-Seminarioj – bona ŝanco por junaj esperantistoj

Viliam Búr (SK) Internaciigo de komputilaj programoj

Wera Blanke (DE) Prapioniroj de nia faka lingvo

Detlev Blanke (DE) Bibliotekoj kaj arkivoj – kelkaj problemoj

Jan Werner (CZ) Ĉarpentistaj lignoligoj

Tibor Kepencay (SK) Traktado pri terminologio kaj koneksaj problemoj de bazaj grandoj de kvanto kaj kvalito

Josef Hron (CZ) Novaj spertoj en la kompilado de la Granda Vortaro Ĉeĥa-Esperanta

Miroslav Malovec (CZ) Maŝinelementoj laŭ Ján Mužlay kaj Július Varinský

² La mallongigo por „Esperanto en Interreto“. E@I (prononcu: e-ĉe-i) estas la nomo de grupo de junaj komputilaj specialistoj, kiuj uzas Esperanton multflanke en la reto.

Jan Niemann/Lene Niemann (DK)

Sermeq Kujalleq – kiel fariĝi parto de la Monda Herdaĵo

Rüdiger Sachs (DE)

Medioprotektado en Afriko

Manfred Westermayer (DE)

Agendo 21 – Civitana Agado por Daŭrigeblo

Frank Nietzsche (DE)

Sciindaĵoj pri la klimato en laborĉambroj

1.3 Esperanto dum la 37-a konferenco de „Gesellschaft für Angewandte Sprachwissenschaft“ (GAL)

En la kadro de la 37-a konferenco de la germana Gesellschaft für Angewandte Sprachwissenschaft (GAL) (Societo pri Aplika Lingvistiko), kiu de 21.-23. Septembro 2006 okazis en la Universitato de Münster, en la sekcio „Socilingvistiko“ Rudolf-Josef Fischer prelegis pri „La influo de feminismaj tendencoj al la lingvo-uzo de Esperanto“.

1.4 16-a konferenco de la Societo pri Interlingvistiko

La germana scienca Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik e.V. [GIL]) ĉiujare, lige al siaj jarkunveno, okazigas fakkonferencon. La 16-a konferenco okazis de la 1-a ĝis 3-a de Decembro 2006 en Berlin. Partoprenis 40 personoj. La kadra temo estis „Esperanto nuntempe – kiel el projekto fariĝis lingvo“. La aktoj aperos en 2007.

Oni prezentis jenajn prelegojn (en la germana lingvo):

Andreas Künzli (Bern):

Planlingvaj projektoj de unua, dua kaj tria grado en Svisio. Kiuj projektoj fariĝis lingvoj kaj kiuj restis efemeraj

Sabine Fiedler (Leipzig)

Pri la esprimkapablo de Esperanto-tradukoj. Inter-lingva kaj intra-lingva komparo kun „Alice’s Adventures in Wonderland”³

Wim Jansen (Amsterdam)

Vortordaj modeloj en la iama kaj nuntempa Esperanto – ĉu atestoj pri natura evoluo de la sintakso?

Toon Witkam (Utrecht)

Aŭtomata morfemanalizo en Esperanto faras kunmetaĵojn pli bone legeblaj sur la ekrano.

Rudolf-J. Fischer (Münster)

La komunika sistemo KOD⁴

Fritz Wollenberg (Berlin)

100 jaroj Esperanto en Berlino: Historiografiaj kaj interlingvistikaj faktoj en nova publikaĵo

Gunnar Fischer (Münster)

Muziko – Parto de la kulturo de la Esperanta lingvo-komunumo

Cornelia Mannewitz (Rostock)

Lingva purismo en slavaj landoj

Ulrich Lins (Bonn)

Du projektoj: 1. La vivo de Zamenhof de Edmond Privat
2. Esperanto en la hispana interna milito

Sebastian Kirf (Essen)

La Agendo 21, la komunika problemoj kaj Esperanto

³ La esperantlingva traduko: „Alico en Mirlando“

⁴ Kp. ankaŭ la artikolon de LIU Haitao en IpI 57, p. 2-5

1.5 Esperanto en kongreso pri la hispana civitana milito

Nova, ampleksa esploro pri la rolo de Esperanto en la hispana civitana milito 1936-39 estis prezentita en internacia scienca kongreso en Madrido, kiu okazis de la 27-a ĝis 29-a de novembro 2006 en la universitato UNED en Madrido, okaze de la 70a jubileo de la komenco de la milito. La kongreson inaŭguris la hispana kulturministro. La prezentado de la esploro pri Esperanto okazis en 60-loka salono, kiu estis plena je historiistoj kaj aliaj scivoluloj, inter ili nur unu esperantisto. La estro de la kunsido prezentis la prelegon kiel "ion tute novan pri kio ni malmulte scias kaj pri kio ni ĉiuj sendube scivolemas". La anticipe decidita tempolimo de 15 minutoj estis longigita per aldonaj kvin minutoj, kaj post la sesio kelkaj ĉeestintoj aliris la aŭtorojn *Toño del Barrio* kaj *Ulrich Lins* por ricevi pliajn informojn. La tekston prezentis *Toño del Barrio* en la hispana lingvo.

Al la kongreso estis senditaj 248 manuskriptoj el kiuj 178 estis aĉceptitaj, inter ili tiu de s-roj *del Barrio* kaj *Lins*, "La utiligado de Esperanto dum la hispana intercivitana milito".

La artikola versio de la prelego — multe pli detala — estis disdonita al la kongresanaro. Oni povas legi ĝian esperantan tradukon sub <http://www.liberafolio.org/2006/civitanamilito>.

(Laŭ Manuel Pancorbo en www.liberafolio.org, 3.12.2006)

2 Estontaj aranĝoj

2.1 Lingvistika konferenco en la Universitato de Kaunas

En la 18-a kaj 19-a de majo 2007-a en Kaunas, Litovujo, en la Fakultato pri Homaj Sciencoj de la Universitato de Vilno (tiu fakultato troviĝas en Kaunas), okazos tre nekutima konferenco – ĝin aranĝos ĉiuj katedroj kune. Tio signifas, ke povas partopreni informadikistoj, filologoj, ekonomiistoj k. a., sed en apartaj larĝaj sekcioj.

Jen la temoj por filologoj:

1. Strategioj por interpreta legado de literaturaj tekstoj: interfaka aliro
2. Teksto kaj lingvo
3. Lingvistiko en interfaka perspektivo: Etno-; Psiko-; Socio-; Inter-; Komputolingvistiko ktp.
4. Tekstoj en kuntekstoj/Kuntekstoj en tekstoj
5. Traduk-studoj kiel Interfako.

La lingvoj de la konferenco ĝis nun certaj estos la litova kaj la angla, sed estas ebleco pri pluaj lingvoj depende de la partoprenantoj. Se kelkaj esperantistoj partoprenos, tiukaze oni povus eĉ aranĝi apartan esperantlingvan sekcion kaj en la aktoj aperigi esperantlingvajn artikolojn. Tio estus antaŭenpaŝo en la Fakultato, en kiu jam okazas kursoj pri Esperanto

Interesiĝantoj bonvolu peti la malnetan programon en la angla ĉe:

Aida Čižikaitė, <aidute@mail.lt>, tel. +370 37 208503, poŝtel. +370 616 15991.

2.2 Globalization and Communication: Enrichment and Threat

A 3 days international linguistic conference to be held at the university of Gdansk (Faculty of Romance Philology). 14th-16th June 2007.

University of Gdansk, Faculty of Romance Philology, Section of Linguistics & Glottodidactics, Bielanska 5 80-851 Gdansk, tel: +48 058 301 36 51.

Globalization and Communication: Enrichment and Threat

The inexorable progress of globalization in the sphere of communication warrants their inevitable confrontation. Languages (their paradigms, particularly the lexical-syntactic ones) are getting to be more and more effective tools of unification under the influence of English which nowadays functions as a Lingua Franca.

This is especially the case if we take into consideration new mass media (internet, etc). However, as Roland Breton rightly pointed out, "considering a language as no more than a means of communication is dangerous reductionism".

In fact, the majority of linguists and experts in other relevant fields of knowledge ask themselves the questions of crucial importance: does the integration of communicative techniques determined by mass media bring to the fore pragmatic and economic aspects of languages at the expense of semantic subtleties and aesthetic aspect?

Do these tendencies, by any chance, lead to the fading of traditional ethnocultural functions of languages, which could eventually threaten their identity?

From this standpoint globalization can be viewed as an extremely complex phenomenon that requires a multidimensional and multidisciplinary description. A few topics for discussion and analysis are presented below:

- A new hierarchy of language functions? (particularly in the informational, expressive, connotative, or ethno-cultural aspect).
- The dynamics of changes in the internal structure of the system (lexical creativity, morpho-syntax).
- The whole range of technolects and profesiolects (especially the language of media and the new "eurolect").
- Discourse and linguistic pragmatics: the function of persuasive discourse, political correctness, neutralization of official formulas, aesthetic standardization.
- Language policy and normative tendencies in the era of linguistic integration.
- Challenges of language instruction and translation in the era of linguistic globalization.
- Functions of the media in the language acquisition process, the role of cultural factors in foreign language instruction, pragmatic aspect of translation, machine translation, etc.
- The advent and expansion of new areas of linguistic exploration or communicative and informational strategies corpus linguistics, computational linguistics, urban dialectology, internet, language technology (Acktil, E-globalcom.net), electronic corpora, telecommunicational codes, etc.

Submission is limited to one abstract authored by an individual or a group of co-authors.

The deadline is December 31st 2006.

Abstracts can be submitted either by post, addressed to the Faculty of Romance Languages at the University of Gdansk or by e-mail at the following address: filgq@univ.gda.pl

Presentations can be made in French, English and Polish.

The fee is 75 zł.

Accommodation costs vary within the range from 35 zł. to 170zł. a night.

We intend to publish the proceedings of the conference.

Further details will be provided in the next circular.

Scientific Committee: Jan Kortas, Joanna Jereczek-Lipinska, Gilles Quentel.

<http://linguistlist.org/issues/17/17-2916.html>

2.3 17-a konferenco de GIL en Berlin pri bibliotekoj kaj arkivoj

La 17-a konferenco de la germana scienca Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik e.V. [GIL]) okazigos sian 17-an konferencon de 23-a ĝis 25-a de novembro 2007 en Berlin. La kadra temo estos „Bibliotekoj kaj arkivoj“. Ĉiu intereso, kiu komprenas la germanlingvajn prelegojn, rajtas partopreni. Kutime ĉeestas 30-40 personoj. Oni eldonos la aktojn. Pri GIL bv. vidi www.interlinguistik-gil.de . Informojn pri partoprenkondiĉoj ĉe la prezidanto de GIL, Detlev Blanke: dblanke.gil@snafu.de .

2.4 Simpozio „Perspektivoj de Esperanto“ en Den Haag

Simpozio sub la kadra temo „Perspektivoj de Esperanto“ okazos sabate, la 3-an de februaro 2007, en la Andreo-Cseh-Domo (Riouwstraat 172, NL-1585 HW Den Haag, Nederlando, telefono +31 70 3556677). Inter la prelegantoj estos Ziko van Dijk (=Marcus Sikosek, pri problemoj de la Esperanto-historiografio), Petro De Smedt (Vortaraj Perikloj), Wim Jansen (Vorton post vorto tra la historio de Esperanto) kaj Gerrit Berveling (Esperanto kaj ĝia kulturo). Fine de la prelegserio estos ronda tablo kun konkludoj de la simpozio. La aliĝkotiĝo estas 25 EUR. La aliĝintoj ricevos konfirmilon.

Informis Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando (orellarojas@yahoo.com)

3 Interlingvistiko kaj Esperanto en Universitatoj

3.1 Doktoriĝo de Marcus Sikosek/Ziko van Dijk

La 3-an de novembro 2006 en Utrecht (Nederlando) okazis doktoriĝo pri Esperanto, nome pri la historio de Universala Esperanto-Asocio. *Marcus Sikosek*, kiu post edziĝo sin nomas *Ziko van Dijk*⁵, germana historiisto, publike defendis sin kontraŭ la demandoj de komisiono, en kiu estis ankaŭ la tutnederlande famaj historiistoj kaj aŭtoroj *Herman van der Dunk* kaj *Maarten van Rossem*. Post laŭdacio fare de la doktriganto *Duco Hellema*, profesoro pri la historio de internaciaj rilatoj, la kunpromocianto *Marc van Oostendorp*⁶ aldonis pli personan gratulon en Esperanto.

Ziko van Dijk, kiu antaŭ sia lastatempa edziĝo nomiĝis *Sikosek*, priskribis la historion de la monda asocio kun atento al politikaj demandoj. Fakte, vere okazis politikaj kunpuŝiĝoj kaj problemoj por UEA, ekzemple rilate al la agadoj de Hitler kaj Stalin, sed per politiko oni ankaŭ kamuflis personajn ambiciojn. Ĝenerale, la Asocio sufiĉe bone trairis la tempestojn de la 20-a jarcento, sed ofte devis sin adapti al la eksteraj kondiĉoj.

Kiaj estis la kazoj *Hans Jakob* kaj *Ivo Lapenna*? Ĉu sovetianoj simple povis membriĝi en UEA? Ĉu judoj povis esti delegitoj dum la Hitler-regado? Kiel UEA akceptis la germanojn post la Dua Mondmilito? Kion oni opiniu pri la altaj membronombroj en orienteŭropaj landaj asocioj? Kvankam en la centro de la libro estas UEA, necesis okupiĝi ofte ankaŭ pri unuopaj landoj. Bazo estis, krom intervjuoj, gazeta trastudado kaj legado de la koncerna literaturo, precipe la arkivo de UEA, kiun van Dijk rajtis uzi.

La rezulto estas germanlingva libro kun 459 paĝoj: “Die neutrale Sprache. Eine politische Geschichte des Esperanto-Weltbundes”. La prezento, ilustrita per parte ankoraŭ nekonataj fotoj el la historio de UEA, flue iras tra la jardekoj kaj ankaŭ ne timas tiun aŭ jenan anekdoton. La aŭtoro

⁵ Ĉe sciencisto la ŝanĝoj de nomoj starigas problemojn al la bibliografo. Ĉe Marcus Sikosek aldoniĝas ne nur la nova geedza nomo sed ankaŭ la fakto, ke jam antaŭe li uzis diversajn nomojn, kiel montras la bibliografio de liaj publikigaĵoj.

⁶ Kiu tamen estas lingvisto, ne historiisto.

prezentis sian verkon en la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 25-an de novembro 2006. La libro estos havebla ĉe la grandaj Esperanto-libroservoj aŭ ĉe la aŭtoro.

Sikosek, Marcus (2006): Die neutrale Sprache. Eine politische Geschichte des Esperanto-Weltbundes. Bydgoszcz: Skonpres, 2006. ISBN 978-83-89962-03-4. 459 Seiten, ill.

Biografio

Marcus Sikosek naskiĝis 11.2.1973 en Kirchhellen/Vestfaliao (Germanio). De 1983-1992 li frekventis la urban Heisenberg-Gimnazion en Gladbeck. Post civila servo li studis en la universitatoj de Bochum, Utrecht kaj Köln la fakojn historio kaj germana filologio. La studojn li finis en 2002 per la titolo Magister Artium. De 2003-2005 Marcus Sikosek estis gvidanto de la Biblioteko Hector Hodler en la Centra Oficejo de UEA, Rotterdam.

Publikigaĵoj

Sikosek, Ziko Marcus (2003): Esperanto sen mitoj. 2-a prilaborita eldono. Antwerpen: Flandra Esperanto-Asocio (Unua eldono: 1999), 366 p.

Sikosek, Marcus (2004): Books and their association: The history of the Hector Hodler Library. En: Language Problems and Language Planning 28, Nro. 1, p. 45-73.

Sikosek, Marcus. (2005): Dokumente zum „Weltspracheverein Nürnberg“. En: Esperantologio - Esperanto Studies (EES), kajero 3, p. 42-51.

Sikosek, Ziko Marcus (2005): Sed homoj kun homoj... Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005. Rotterdam: UEA, 197 p.

Rimarkoj de la redaktoro

Ankaŭ mi estis „intervjuita“ de la aŭtoro pri diversaj problemoj de la laboro de GDREA kaj la agado en la orientaj eŭropaj landoj. Tio bedaŭrinde ne efikis objektive al la prezento de kelkaj ĉapitroj. La aŭtoro evidente ne vere interesiĝis pri la vidpunktoj de tiuj, kiuj siatempe realigis la laboron.

Liaj kliŝaj ideoj pri la Esperanto-movado en la orienteŭropaj landoj klare videblas en la ĉapitroj „Osteuropa im und nach dem Spätstalinismus“ („Orienta Eŭropo dum kaj post la malfrua stalinismo“; la aŭtoro celas la periodon 1949-1989, p. 255-275), „Der Weltbund und die kommunistischen Länder“ („La Universala Asocio kaj la komunismaj landoj“, p. 294-323) kaj „Der andere deutsche Landesverband“ („La alia germana landa asocio“, kie la aŭtoro celas la Esperanto-organizaĵon de GDR, p. 360-365).

Por siaj studoj la aŭtoro ekz. ne utiligis la ampleksajn materialojn pri la historio de GDREA, de kiuj ekzistas ĉ. 4000 paĝoj, kompilitaj de 25 aŭtoroj (kp. la bibliografion en „Interlinguistische Informationen“ 41 [4/2001] kaj 52-53 [3-4/2004], krome en IpI 53 [2/2005]).

La tre videble negativa sinteno de la aŭtoro pri ĉio, kio koncernas la orienteŭropajn landojn kaj la fakto, ke li ne komprenis la laborojn de la esperantistoj tie, ne malofte lin gvidas en sia libro al neafereca ironia stilo, kiu estas nekutima por scienca esploraĵo. Anekdotecaj priskriboj de unuopaj faktoj, ofte prezentitaj sen kompreno pri la historia kunteksto, peras unuflankan bildon pri la agado de diversaj personoj sub komplikaj historiaj kondiĉoj. La scienca objektiveco, postulenda por doktora disertaĵo, devas esti pridubata, almenaŭ por partoj de la teksto.

Detlev Blanke.

3.2 Interlingvistika kurso en la Sankt-Peterburga universitato

Kiel informis Esperanto novosti (<http://e-novosti.info>) en Sankt-Peterburga ŝtata universitato en la filologia fakultato la 16-an de oktobro 2006 komenciĝis "Speciala kurso pri sociolingvistiko. Lingvoj de la mondo. Esperanto". La kurson gvidas la doktora aspiranto Oksana Burkina, helpe de la docento de la katedro de ĝenerala lingvistiko *V. B. Gulida* kaj instruisto de la katedro de matematika lingvistiko *Vjaĉeslav Ivanov* (pli konata inter esperantistoj kiel *Slavik Ivanov*).

3.3 Interlingvistika sesio en Poznano kun publikaj prelegoj por neesperantistoj

20 gestudentoj el 10 landoj partoprenis la trian semestron de la Interlingvistikaj Studoj de UAM inter la 23-29-a de septembro 2006. *Prof. John Wells* gvidis kurson pri la bazoj de ĝenerala kaj esperanta fonetiko. *Doc. Michel Duc Goninaz* prezentis problemojn de esperanta sintakso.

István Ertl traktis ĉapitrojn el la tria periodo de esperanta literaturo kaj analizis poemojn de William Auld. *Michael Farris* (instruisto en UAM) faris enkondukon al ĝeneralaj leksikologio kaj semantiko. *Małgorzata Nitkowska*, pola studentino el la antaŭa grupo, sukcese defendis sian diplomlaboraĵon "Propedeŭtika valoro de Esperanto por la lernado de la angla lingvo" sub la gvido de *Maria Majerczak*.

La sciencan programon akompanis agrabla varmaŭtuna renkontiĝo kun poznanaj esperantistoj en la ĝardeno de unu el la partoprenantoj.

Kiel tradicie aŭtune, la universitatan sesion kompletigis la riĉa arta programo de la 22-a Arkones kun signifa kontribuo de la prelegantoj kaj ankaŭ de parto de gestudentoj (pri Schwartz, francaj kanzonoj, problemoj de tradukado, diskuto pri W.Auld, DVD "Esperanto elektronike", rusoj, esperanta slango, lingvaj rajtoj).

La publikaj prelegoj pri lingvopolitiko en EU en la universitato post la sesio por neesperantistoj estis nova iniciato. Krom la prelegantoj de IS kontribuis *Małgorzata Handzlik*, eŭrodeputitino.

Publikaj prelegoj pri lingvopolitiko en EU en la Universitato Adam Mickiewicz.

La 30-an de septembro 2006 posttagmeze, tuj post la interlingvistika sesio okazis publikaj prelegoj en UAM pri lingvopolitiko organizita far la Interlingvistikaj Studoj. La nova iniciato celis montri al la universitata kaj urba publikoj la lingvan situacion kaj problemojn en EU kaj la kontribuon de esperanto al la solvo de la problemoj, krome prezenti interesajn lingvistikajn faktojn perhelpe de esperanto.

La aranĝon malfermis *prof. de hab. M. Kreglewski*, vicrektoro de UAM, poste sekvis trarigarda prelego de *Małgorzata Handzlik*, eŭrodeputitino, pri lingva situacio en la pola lingvo. *István Ertl* disponigis datumojn pri la tradukado en EU en esperanto kun pola interpreto. *Dr. Detlev Blanke* traktis eblajn solvojn por la EU-komunikado ne prisilentante la problemojn.

En la dua parto okazis surpodia diskuto pri internacia kaj interkultura komunikado gvidata de *dr. Zbigniew Galor*, kie ĉiuj emfazis la multlingvecon kaj multkulturecon de Eŭropo kaj la eblan kontribuon de planlingvo. Krom la kostoj aperis ankaŭ la kvalito de komunikado.

La tria parto entenis du prelegojn: unue *prof. John Wells* gvidis la partoprenantaron tra la mirinda mondo de sonoj, poste *doc. Michel Duc Goninaz* tra la mirinda mondo de vortoj. La aranĝon resumis kaj fermis *dr. Ilona Koutny*, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj.

3.4 Bakalaŭreco Duin

La 30-an de junio 2006 ĉe la Universitato de Amsterdam bakalaŭre finstudis en la fako „Ĝenerala Lingvistiko“ s-ro *Orrin Duin*. Sub la mentorado de la docento pri Interlingvistiko kaj Esperanto,

Wim Jansen, li verkis nederlandlingvan disertacion titolitan „Esperanto – Teorie kaj Praktike“, per kiu li publikigas siajn esplorojn pri la natureco de Esperanto, mezurita laŭ 45 propraĵoj de homa lingvo, kiujn Greenberg asertas universale validaj. La esploron antaŭas tipologia karakterizo de Esperanto, cele al la identigo de tiuj kategorioj kaj funkcioj, kiuj rolas en la Greenberg-aj universalajoj kaj de tiuj universalajoj, kiuj estas aferkoncernaj por Esperanto. Por sia esploro li kolektis kaj analizis nombrojn da interrete haveblaj tekstoj en moderna Esperanto de lingve, kulture kaj geografie plej diversaj aŭtoroj.

El la konkludoj elstaras la konstato, ke la granda plimulto de la Greenberg-aj universalajoj retroveblas en moderna Esperanto, kio kontribuas al konfirmo de la „natureco“ de la lingvo (laŭ la kriterio de Greenberg). En eta malplimulto de tri propraĵoj aperas devioj de la Greenberg-a natureco, sed tiuj devioj estas facile klarigeblaj laŭ kriterioj el la pragmatiko kaj semantiko, alivorte laŭ naturaj bezonoj de interhoma komunikado. La teksto (sen la akompana cd-rom) estas havebla ĉe la Internacia Esperanto-Instituto kontraŭ la kostoj de reprodukto kaj ekspedo.

La kompleta titolo de la disertaĵo:

Duin, Orrin (2006): Esperanto, Theorie en Praktijk. Algemene Taalwetenschap, Universiteit van Amsterdam. 42 S.

Atilio ORELLANA ROJAS
Internacia Esperanto-Instituto
Riouwstraat 172
NL-2585 HW den Haag
Nederlando

3.5 Oficialaj Esperanto-Kursoj en la Universitato de Kalifornio

La fakultato de Lingvistiko de la Universitato de Kalifornio en San Diego anoncas la starigon de oficiale aprobitaj kursoj pri Esperanto. Tiuj kursoj okazos somere kaj estos malfermitaj al la tutmonda esperantistaro.

La Universitato de Kalifornio en San Diego, ankaŭ konata laŭ la anglalingva siglo UCSD (www.ucsd.edu), estas unu el la plej konataj kaj prestiĝaj universitatoj en Usono, kaj inter ĝiaj profesoroj troviĝas ok Nobel-premiitoj. Ĝi situas apud la pacifika marbordo en suda Kalifornio, proksime de la landlimo inter Usono kaj Meksiko.

La kursaro daŭrigos la tradicion de la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), okazinta dum 30 jaroj en San Francisco kaj dum la lastaj jaroj en Vermonto. Honore al tiu tradicio, la nova kursaro en San Diego ĉi-somere pritraktos interalie la verkaron de la lastatempe forpasinta aŭtoro William Auld, la unua instruisto en NASK en San Francisco.

La instruista teamo en somero 2007 konsistos el *Paul Gubbins*, kiu gvidos la superan kurson, kaj *Lee Miller*, kiu gvidos kurson por progresantoj. *Grant Goodall*, profesoro en la universitato kaj direktoro de ties lingva fako, estros la kursaron.

La kursaro okazos inter la 9-a kaj la 27a de julio 2007. La universitato bonvenigas ĉiujn interesiĝantojn al siaj someraj kursoj, sendepende de antaŭa universitata studo.

Por intervjuoj kaj pli ampleksaj informoj pri la oficialigo kaj starigo de la kursoj:

Grant Goodall goodall@ling.ucsd.edu

Por informoj pri registriĝo, stipendioj, ktp: Ellen Eddy eddyellen@aol.com

3.6 Esperanto en universitatoj de Liaoning, Ĉinio

Esperanto por amaso da studentoj

La 9-an de septembro 2006 pli ol 260 studentoj anoncis sin por la kurso pri „Evolua historio de Esperanto“, funkciigita en Liaoning Universitato, sidejo de Liaoning-provinca Esperanto-Asocio (LEA). 130 studentoj el tiu universitato elektis Esperanton kiel nedevigan studobjekton kaj lernis ĝin en du kursoj.

La instruistino de unu kurso estas diplomito de la kurso por eduki Esperanto-instruistojn, kiun funkciigis LEA en la universitato en la lernojaro 2005-2006. Ŝi finverkis kaj ĵus eldonis libron pri Esperanto.

LEA donacis librojn al Tajvano

Informiĝinte, ke Esperanto-Centro en Kaoshiung en Tajvano urĝe bezonis librojn verkitajn en la ĉina lingvo, LEA speciale kunvenis kaj decidis donaci librojn al la centro. En septembro 2006 f-ino *Klementino Lin*, respondeculino de la centro, ĝoje rete diris al ni, ke ŝi jam ricevis ilin. Lastatempe ŝi plu esprimis, ke ŝi aĉetos plimultajn libron el LEA por festi la naskiĝtagon de Zamenhof en decembro 2006.

Shenyang Konstrua Universitato aliĝis al LEA

La 13-an de oktobro 2006 Shenyang Konstrua Universitato oficiale transdonis peticion aliĝi al LEA kiel grupo-membro. Ĝi estas la unua grupo-membro de LEA.

Nuntempe Esperanto-kurso estas en streĉa preparo.

Kleriga Bazo de Esperanto por Altlernejoj en la provinco Liaoning

La 18-an de oktobro 2006 Shenyang Muzika Universitato oficiale enkondukis Esperanton kiel nedevigan studobjekton kaj funkciigis la unuan kurson en la lernojaro 2006 kaj 2007. 85 studentoj aperis en ĝi. Koincide sur la pordego de la universitato oficiale pendis la kupra tabulo kun la vortoj: Kleriga Bazo de Esperanto por Altlernejo en Liaoning. Tio rezultis el kunlaboro inter LEA kaj la universitato.

Ĝi celas disvastigi Esperanton kaj esplori Esperanto-instruadon en altlernejoj de la provinco.

Okazis Esperanto-Seminario de Altaj Lernejoj en Liaoning

La 18-an de oktobro 2006 sub forta vento kaj pluvego estroj el la fremdlandaj lingvaj institutoj (fakultatoj) de 11 universitatoj en la provinco Liaoning venis al Liaoning Universitato por Esperanto-Seminario de Altaj Lernejoj en Liaoning organizata de LEA kaj Liaoning-provinca Instrua Instituto de Fremdlandaj Lingvoj por Altlernejoj (LIIFLA).

La seminario celas efike antaŭenpuŝi la 2-an Kvinjaran Laborplanon de LEA por la 21-a jarcento kaj pliprofundigi Esperanto-instruadon de altaj lernejoj en la provinco. Ĝi estis la unua fojo por la provinco kaj neofta okazo por Ĉinio.

S-ro *Zhang Zhiming*, vic-prezidanto de LEA, ĝenerala sekretario de LIIFLA kaj estro de Fremdlanda Lingva Instituto el Shenyang Universitato, prezidis ĝin kaj unuavice faris paroladon. En ĝi li priparolis la signifon kaj celon de ĉi tiu seminario kaj historion de Esperanto.

S-ro *Liu Zhengkun*, prezidanto de LEA, emfazis en sia parolado, ke Esperanto-instruado en altlernejoj estas plej efika metodo disvastigi Esperanton en la nuna Ĉinio.

S-ro *Song Yunsheng*, honora prezidanto de LEA, ekzemple priskribis la rolon de Esperanto en la pasinteco kaj la nuntempo. S-ro *Wu Guojiang*, vic-prezidanto de LEA, eks-komitatano B kaj delegito de UEA, prezentis UEA, KAEM kaj ILEI, kaj la situacion de Esperanto-instruado de

altlernejoj en la mondo. Poste sekvis varma diskuto. Ĉiuj estroj donis siajn proponojn aŭ opiniojn koncerne la seminarion. La 3-hora seminario atingis la sube komunan konscion:

- (1) Grandskala evoluo de Esperanto rezultos el altaj lernejoj kaj rapidigos paŝon popularigi Esperanto-instruadon.
- 2) Necesas aktive kontakti la koncernajn departementojn por restarigo de Esperanto kiel ekzamenan objekton.
- (3) Necesas krei taŭgajn kondiĉojn por eduki Esperanto-instruistojn kun bona kvalito, ekz. okaze de progresita kurso, enkonduko de elstaraj alilandaj Esperanto-instruistoj, praktikado en internaciaj aranĝoj aŭ ejoj en kiuj oni tute uzas Esperanton ktp.
- (4) Oni regule sendu estraranojn de LEA al la altaj lernejoj, kiuj enkondukis aŭ preparas Esperanto-kurson por gvidi iliajn laborojn.
- 5) Necesas substreki la rolojn de internacia kunlaboro kaj apliko.
- (6) Ĉiujare okazu la seminario kiel sistemo aŭ kutimo.

La estroj, kies institutoj ne enkondukis Esperanton, certis, ke ili programu Esperanton en la instruan projekton kiel eble plej rapide. LEA kaj LIIFLA entute invitis la priajn estrojn el pli ol 20 universitatoj, sed kelkaj en aliaj urboj ne venis pro la aĉa vetero sed tuj telefone esprimis, ke ili aktive reagis al la decido aŭ spirito de la seminario.

Indas menci, ke oni tre serioze atentis tiun ĉi seminarion. Tion pruvas eta okazo, ke ĉiu ĉeestinto memkonscie fermis sian poŝtelefonon por eviti ajnan eventualan ĝenon. Bona rezulto venas el bona komenco. Estas antaŭvideble, ke Esperanto-instruado komenciĝos en dek kelkaj altaj lernejoj en la venontaj unu aŭ du jaroj, granda tajdo de Esperanto formiĝos en Liaoning!

(S-ro Wu Guojiang, Vicprezidanto de LEA>

Adreso: Fushun Shiyoyichang Yanjiusuo, CN-113008 Fuhsun Liaoning Chinio.

Retadreso: amikeco999@21cn.com, ghemelurboj@yahoo.com.cn)

3.7 Litovaj rektoroj

La Universitato de Siauliai, Litovio, ĉi-jare eldonis prestiĝan libron "Lietuvos universitetu rektoriai (1990- 2004)" (Rektoroj de Litoviaj universitatoj - 1990-2004). La eldonon de la libro financis la Konferenco de rektoroj de Litoviaj universitatoj. Temas pri libro-albumo, kie enestas artaj fotoj de 39 rektoroj de diversaj litoviaj universitatoj, mallongaj biografioj de tiuj rektoroj kaj rakontoj de ili mem pri si. Sur la paĝoj 28-29 estas publikigita foto kaj teksto pri *prof. habil. dr. Aloyzas Gudavicius*, kiu estis rektoro de universitato de Siauliai dum 1991-1997. En lia prezento estas notite, ke li estas membro de Litova Esperanto-Asocio. Ankaŭ estas menciite, ke li inter multaj aliaj verkis libron "Interlingvistikos ivadas" (2002). Sur la paĝoj 86 - 94 estas resumo pri la rektoroj en angla lingvo. Ankaŭ tie sur la paĝo 88 estas notita, ke li estas membro de Litova Esperanto-Asocio kaj ke li verkis "Enkondukon en interlingvistikon". Nuntempe *prof. habil. dr. Aloyzas Gudavicius* estas vicprezidanto de Litova Esperanto-Asocio, prezidanto de Senato de Universitato de Siauliai. La libro estas lukse presita kaj bone reprezentas universitatojn de Litovio.

Povilas Jegorovas litova.ea@mail.lt

3.8 Internacia superrigardo pri Esperanto en universitatoj

La belga pedagogo *Germain Pirlot* dum jaroj ĉiam denove kompilas aktualajn superrigardojn pri tiuj universitatoj kaj alternejoj, kie Esperanto (ĉefe) kaj interlingvistiko (malofte) estas instruataj. Informojn donas: gpirLOT@esperanto.org .

4 Honorigoj kaj personaj bibliografioj

4.1 Werner Bormann okaze de lia 75-jariĝo

La diplomita ekonomo *D-ro Werner Bormann* el Hamburgo la 27-an de oktobro 2007 festis sian 75-an naskiĝtagon. Li povas retrorigardi i.a. al multflanka scienca kaj sciencorganiza laboro en la medioj de interlingvistiko. Ekz. de 1963 ĝis 2000, kun interrompoj, li estis instrukomisiito pri Esperanto kaj (poste) pri interlingvistiko ĉe la Universitato de Hamburgo. Li estis prezidanto de la Akademio de Esperanto kaj estas profesoro de la Akademio Internacia de Sciencoj San Marino (AIS).

Werner Bormann faris multajn prelegojn ne nur pri esperantologiaj kaj interlingvistikaj temoj, sed ankaŭ pri temoj de ekonomio kaj historio. Li publikigis multajn koncernajn materialojn. Por la jubileulo ne ekzistis fendo inter teorio kaj praktiko. Pro tio li ankaŭ agis en diversaj gvidaj funkcioj de la lingvo-komunumo de Esperanto, i.a. en Universala Esperanto-Asocio, Germana Esperanto-Asocio kaj en la Societo pri Interlingvistiko.

Jen la listo de liaj interlingvistikaj publikigaĵoj:

Mallongigoj

LMLP	La Monda Lingvo-Problemo (Den Haag: Mouton)
IIS	Interlingvistika Informa Servo (Reinbek)
grkg	Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft/Humankybernetik (Paderborn)
REC	recenzo
Nr.	numero

1962

- La ŝancoj de Esperanto en la nuna fazo de la evoluo. En: IIS, Nr. 2, p. 30-35.

1964

- Eta rezulto de granda provo. En: IIS 1, p. 2-4.

1965

- Atismo kaj itismo. En: IIS 4, p. 43-47.

1966

- Sciencaj obstakloj por internacia lingvo. En: IIS 3, p. 36-42.

- La scienca pritraktado de Esperanto. En: IIS 3, p. 30-36.

- Interlinguistik. En: Germana Esperanto-Revuo, Jarkolekto 5, p. 66.

1970

- Bona Ŝanco (12 eseoj pri la Internacia Lingvo) La Laguna: Stafeto, 247 p.

- Das Sprachenproblem in den Europäischen Institutionen. En: LMLP 2., Nr. 5 (Den Haag: Mouton), p.114-126.

1973

- Die Position der deutschen Sprache. En: LMLP, 5, Nr. 13, p. 18-34.

- Rec. pri Décsy, Gyula (1973): Die linguistische Struktur Europas, Wiesbaden: Harrassowitz, 300 p. En: LMLP 5, Nr.14, p. 113-116.

1974

- Die Einigung Europas und ihr Sprachenproblem, Dokumente und Informationen des Deutschen Esperanto-Instituts, Nürnberg: Ludwig Pickel, 12 p.

1977

- La lingva problemo en la Eŭropa Komunumaro, (Esperanto-Dok. 8E), Rotterdam: UEA, 8 p.

1981

- La reala evoluo de la vorttrezoro en planlingvo. En: Meyer, Ingeborg (Red.). Interlinguistik in Wissenschaft und Bildung, 5. Werkstattgespräch. Paderborner Arbeitspapiere). Paderborn: Universität (Institut für Kybernetik, Forschungs- und Entwicklungszentrum für objektivierte Lehr- und Lernverfahren), p. 48-52 (Represo en: Internacia Pedagogia Revuo 14, Nr. 1, p. 18-22).

- Funktion und Kultur des Esperanto, Schriftenreihe des Deutschen Esperanto-Instituts, Augsburg: Deutscher Esperanto-Bund, 32 p.

- Feminisma lingvo-uzo en planlingvoj. En: Lobin, Günter (Red.): Kommunikation und Kybernetik, 6. Paderborner Novembertreffen. Paderborner Arbeitspapiere). Paderborn: Universität (Institut für Kybernetik, Forschungs- und Entwicklungszentrum für objektivierte Lehr- und Lernverfahren), p. 253-265.

1982

- Ekzameno – finpunkto kaj kulmino de kurso. En: Barcsay, Zsuzsa (Red.): Metodiko en la praktiko. Paderborn: Esperanto-Centro Paderborn; Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, p.16-20.

-Wissenschaftliche Esperanto-Arbeit. En: Esperanto in Theorie und Praxis, Seminar des Deutschen Esperanto-Instituts in Herzberg/Harz. Seminare. Dokumentation I. Augsburg: Deutsches Esperanto-Institut, p. 6-11.

1984

- La evoluo de Esperanto kaj la Akademio. Publikaĵoj de Germana Esperanto-Instituto 7. Meßkirch/Baden-Württemberg:Bavelo, 14 p.

- Diskriminacio pro hejmlando. En: Diskriminacio. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 66-75.

1985

- La nova komunikada sistemo. En: Sciencaj komunikaĵoj (Budapest Scienca Eldona Centro), Nr. 3 (10), p. 56-63.

1986

- Das Anforderungsprofil an eine Plansprache. En: Lobin, Günter (Red.): Bericht über das Paderborner Novembertreffen 1985 mit dem 25. Kybernetisch-Pädagogischen Werkstattgespräch und dem 7. Interlinguistischen Werkstattgespräch (21.-23.Nov. 1985), Arbeitspapier Nr. 69. Paderborn: Universität Paderborn (Institut für Kybernetik). p.118-125.

1987

- Mondlingvo longperiode. En: Serta gratulatoria in Honorem Juan Regulo Volumo II Esperantismo, La Laguna: Universidad de La Laguna, p. 95-107.

- Internacia kaj naciaj lingvoj. En Mattos, Geraldo (Red.): Centjara Esperanto. Capeco-SC: Fonto, p. 31-38.

- Wie bleibt eine Plansprache im Gebrauch einheitlich? Das Beispiel Esperanto, En: Arbeitspapier über das Interlinguistische Werkstattgespräch. Paderborn: Universität Paderborn (Institut für Kybernetik), p.173-180.

1988

- Kontrolado de lingva unueco. En: El Popola Ĉinio, Nr. 7, p. 20-21.

- Kolonoj apogantaj Esperanton. En: 100 Jahre Esperanto-Gruppe Nürnberg. Augsburg, p. 14-17.

- Gvidantoj kaj gvidatoj. En: Čolić, Senad (Red.): Sociaj aspektoj de la Esperanto-movado. Sarajevo: Savez za Esperanto BiH, p. 98-102.

1990

- Lingvo estas lingvosciencia afero kaj socia fenomeno. En: Eichholz, Rüdiger (Red.): Akademijaj studoj 1988-1990, Bailiboro: esperanto press, p. 85-90.

1991

- Situacio kaj ebloj de la Esperanto-movado. En: Auld, William (Red.): Nova Esperanta Krestomatio, Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 268-278.

1992

- Evoluinta kompreno de interlingvistiko. En: grkg, 33, Nr. 1, p. 3-6.

1993

- Mondkomerco kaj lingvo. Studmaterialo de AIS. Hamburg, 46 p.

- Fakvortoj en ekonomio, la faklingvo en Esperanto, la terminologia centro de UEA kaj la Akademio de Esperanto. En: La Letero de l' Akademio de Esperanto, Nr. 23 (Aprilo-Majo-Junio), p. 3-4.

1994

- La faklingvo en Esperanto. En: La Letero de l' Akademio de Esperanto, Nr. 26 (Januaro-Februaro-Marto), p. 3-5 (Represo en Heroldo de Esperanto 7/1974, p. 3-4; Eventoj Nr. 56 (2/Junio), p. 3, Esperanto Nr. 6/1994, p. 106-107.

- Lingve survoje / Auf dem Weg zu einer Sprachenlösung. En: Bormann, Werner/Frank, Helmar (Red.): Por plurlingveco de Europo (Für Europas Mehrsprachigkeit), Berlin & Paderborn: Akademia Libroservo, p. 9-119.

- Funktion und Kultur zweite überarbeitete Auflage nach 1981. Bonn: Deutscher Esperanto-Bund, 27 S.

1995

- Die Hamburger Interlinguistik-Vorlesung. Kiel: Strigo, 127 p.

- Elementoj de la esperantismo. Studienmaterial des Esperanto-Instituts Hamburg, 16 p.

1996

- Defio faklingvo. En: Chrdle, Petr (Red.): Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto. Dobřichovice (ĉe Prag): KAVA-PECH, p. 57-71.

- Eine Plansprache als 12. Vertragssprache. En: Becker, Ulrich (Red.): Translation in Plansprachen. Beiträge gehalten auf der 5. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 24.-26. November 1995 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 1. Berlin: Gesellschaft für

Interlinguistik, p. 34-38 (Esperanto-versio: Planlingvo kiel 12-a traktatlingvo. En: grkg, 37, Nr. 9/1996, p. 111-118).

- Sennacieco kiel karakterizilo de Internacia Lingvo. En: Sennacieca Revuo, Nova Serio, Nr, 124, p. 26-27.

1997

- Kostoŝpara glatigado en komunikado. En: Selten, Reinhard (Eld.): Die Kosten der europäischen (Nicht-)Kommunikation. Rom: Esperanto Radikala Asocio, p. 50-64 (aperis ankaŭ en la angla kaj itala).

1998

- Interlingvistikaj spertoj pri/por planlingvaj Akademioj. En: Gecső, Tamás (Eld.): Memorlibro. Kolekto de la prelegoj dum la solena internacia konferenco organizita okaze de la tridekjariĝo de la universitata fako Esperantologio (Budapeŝto, 17/18-04-1997). Budapest: Universitato Eötvös Lorand, p. 362-369.

- Die Esperanto-Bewegung in den gesellschaftlichen Strömungen ihrer Zeit. En: Becker, Ulrich (Red.): Soziokulturelle Aspekte von Plansprachen. Beiträge gehalten auf der 7. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 7.-9. November 1997 in Berlin. Interlinguistischen Informationen. Beiheft 4. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, p. 30-33 (Represo en: Esperanto aktuell 2000: Nr. 2, p. 18; Nr. 3, p. 16-18).

- Konsequenzen aus Plansprachen. En: Lobin, Günter/ Lohse, Heinz/ Piotrowski, Siegfried/ Poláková, Eva (Eld.): Europäische Kommunikations-Kybernetik heute und morgen. Dobřichovice: KAVA-PECH, München: KoPäd, p. 159-166.

1999

- La alternativo. En: Benczik, Vilmos (Red.): Lingva arto. Jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 25-30.

- Novaj defioj antaŭ la Akademio de Esperanto. En: Blanke, Detlev/ McCoy, Roy/ Buller, Osmo (Red.): Por aktiva lingvopolitiko. Aktoj de la lingvopolitika Seminario en la 81-a Universala Kongreso de Esperanto Prag 1996. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 35-42.

2001

- Hamburgo plurfoje. En: Minnaja, Carlo (Red.): Eseoj memore al Ivo Lapenna. Kopenhagen: Kehlet, p. 223-241.

- Verschiebungen im Machtgefüge. En: Fiedler, Sabine/Liu, Haitao (2001, Red.): Studoj pri interlingvistiko. Studien zur Interlinguistik. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke. Dobřichovice: KAVA-PECH, p. 57-69.

- La Eŭropa Jaro de la lingvoj. En: Kongressbuch des 78. Deutschen Esperanto-Kongresses 2001 in Ludwigshafen, Freiburg im Breisgau. Deutscher Esperanto-Bund, p. 4-7.

- Die letzte Instanz. En: Blanke, Detlev (Red.): Zur Struktur von Plansprachen. Beiträge der 10. Tagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 17.-19. November 2000 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft Nr. 7. Berlin, Gesellschaft für Interlinguistik, p. 93-110.

2002

- Braucht Europa eine neue gemeinsame Zweitsprache? En: Frank, Helmar (Eld.): Europas Sprachlosigkeit, Festschrift 25 Jahre Europa-Klub. München: KoPäd, p. 92-96.

2004

- Interlingvistiko, planlingvoj kaj iliaj ecoj / Interlinguistik, Plansprachen und ihre Eigenschaften. En: Acta Sanmarinensia Vol. VI Nr. 1, Göttingen: Leins, 40 p.

2005

- Das soziale Phänomen. En: Blanke, Detlev (Red.): Internationale Plansprachen – Entwicklung und Vergleich. Beiträge der 14. Tagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 5.-7. November 2004 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft Nr. 12. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, p. 32-4

(Aldone pluaj artikoloj en revuoj kaj bultenoj)

Kunlaboro ĉe la kompilado de vortaroj

1974

- Internationales Wörterbuch für Handel und Wirtschaft in neun Sprachen, Deventer: Kluwer

1996

Sindikata Terminaro. Antwerpen: IKEF.

2000

- Inkotermoj (Incoterms). Paris: ICC Publishing S.A.

2002

- Dokumentaj Kreditoj. Paris: ICC Publishing S. A..

2002

- La nova Plena Ilustrita Vortaro (la sekcioj “Trafiko kaj veturiloj teraj” kaj “Geografio socia, pri Germanio”) Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda).

4.2 Ronald Löttsch okaze de lia 75-jariĝo

La multflanka lingvisto kaj slavisto *Prof. Dr. Ronald Löttsch*, Berlin, la 1-an de Oktobro 2006 festis sian 75-an naskiĝtagon. Li konatiĝis per multaj filologiaj, lingvistikaj kaj lingvo-politikaj publikigaĵoj. Jam en 1991 la bibliografio de lia verkoj ampleksis pli ol 160 erojn (Vidu „Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung, ZPSK 44(1991) Nr. 4, p. 395-401).

Intertempe la nombro konsiderinde kreskis.

Lia ĉefa verko sendube estas la duvoluma granda vortaro Germana-Rusa, kiu estiĝis sub lia redakto (Deutsch-Russisches Wörterbuch in zwei Bänden, Berlin: Akademie-Verlag 1983, 3-a eldono 1991; Vol. 1: 1076 p., Volumo 2: 1177 p.).

Ankaŭ vortaro de la jida lingvo venis el lia plumo.(Jiddisches Wörterbuch [por germanoj]: Leipzig: Bibliographisches Institut 1990, 204 p.).

Dum multaj jaroj Ronald Löttsch laboris en la Centra Instituto por Lingvistiko de la Akademio de Sciencoj de GDR. Dum la lastaj jaroj antaŭ lia emeritiĝo li estis profesoro pri la filologio de la soraba lingvo ĉe la universitato de Leipzig.

De 1984 ĝis 1999 li estis la gvida redaktoro de la internacie renoma lingvistika revuo „Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung“ (ZPSK), ekde 1993 kun la nova nomo „Sprachtypologie und Universalienforschung“ (STUF).

Ronald Löttsch estis la lasta prezidanto de GDREA antaŭ ĝia unuiĝo kun GEA. Li apartenas al la kunfondintoj de „Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL) [Societo pri interlingvistiko] en 1991 kaj estis ties vicprezidanto ĝis 1999.

Bibliografio de Ronald Löttsch pri interlingvistiko

Mallongigo

ZPSK Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung

1986

- REC pri: Erich-Dieter Krause, Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Leipzig 1983. En: ZPSK 39 (1986) 2, p. 284-287.

- Interlinguistik-Seminar in Ahrenshoop, 28.10.-1.11.1985. En: ZPSK 39 (1986) 3, p. 410.

1990

-. (kun Detlev Blanke): Interview mit dem Vorsitzenden von GDREA. En: der esperantist 26(1990)4 (162), p. 74-76.

1991

- Tempus, Passiv und Aspektualität im Esperanto (zur –ata/-ita-Problematik). En: ZPSK 44 (1991) 4, p. 402-414.

- Grammatische Germanismen im Esperanto. En: ZPSK 44 (1991) 6, p. 695-703.

1996

- Aktive Wörterbücher und Esperanto. En: Becker, Ulrich (Red.): „Translation in Plansprachen“. Beiträge gehalten auf der 5. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik, 24.-26. November 1995, in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 1. Berlin: GIL, p. 52-57.

1997

- Sprachpolitik in supranationalen Gebilden. En: Moelleken, Wolfgang/ Weber, Peter J. (1997, eds): Neue Forschungsarbeiten zur Kontaktlinguistik. Plurlingua XIX (Bonn: Dümmler), p. 339-347.

- Das „Wort“ – die Grundeinheit des Lexikons? En: Becker, Ulrich (Red.): „Terminologiewissenschaftliche Aspekte der Interlinguistik“ Beiträge gehalten auf der 6. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik, 15.-17. November 1996 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 2. Berlin: GIL, p. 29-33.

1998

Zwölf Thesen und zwei Texte zu einer alternativen deutschen Rechtschreibung. En: Becker, Ulrich (Red.): „Soziokulturelle Aspekte von Plansprachen“. Beiträge gehalten auf der 7. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 7. - 9. November 1997 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 4. Berlin: GIL, p. 55-56.

1999

- Streckformen als Problem der einsprachigen Terminologieentwicklung. En: Becker, Ulrich (Red.): „Interlinguistik und Lexikographie“. Beiträge gehalten auf der 8. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 6.-8. November 1998 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 5. Berlin: GIL, p. 54-62.

2001

- Ethnonyme und Staatsbürgerbezeichnungen im Deutschen, Russischen und Esperanto. En: Fiedler, Sabine/ LIU Haitao (2001, Red.): Studoj pri interlingvistiko. Studien zur Interlinguistik. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag. Dobřichovice (Praha): KAVA-PECH, p. 407-419

- Zum typologischen Reichtum europäischer Sprachen. En: Blanke, Detlev (Red.): „Sprachenpolitik in Europa“. Beiträge einer Veranstaltung des „Vereins zur Förderung sprachwissenschaftlicher Studien e.V.“ (VFSS) und der „Gesellschaft für Interlinguistik e.V.“ (GIL) am 13. November 1999 sowie der 9. Jahrestagung der GIL, 12.-14. November 1999, in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 6. Berlin: GIL, p. 30-48

4.3 Aleksandr Duliĉenko okaze de lia 65-jariĝo

La internacie konata lingvisto *prof. d-ro. Aleksandr Duliĉenko* instruas ĝeneralan lingvo-sciencan kaj slavistikon en la universitato de Tartu/Estonio. Li publikigis multajn verkojn pri interlingvistikaj temoj. Okaze de lia 65-a naskiĝtago, la 30-an de Oktobro 2006, liaj kolegoj prezentis al li festlibron, kiu ankaŭ entenas interlingvistikan sekcion. Krome aperis broŝuro kun gratuloj kaj lia bibliografio kiel aparta libro.

En la jaro 2005 *prof. Duliĉenko* estis distingita per la esplorpremio de la Alexander-von-Humboldt-Stiftung (Bonn-Bad Godesberg). Li estas membro de Göttinger Akademie der Wissenschaften. Ni prezentos resumon de lia ĝisnuna interlingvistika vivo, kiun la jubileulo mem verkis, krome la interlingvistikan parton de lia bibliografio kaj informojn pri la eldonaĵoj, kiuj aperis honore al li.

4.3.1 Mia vojo al interlingvistiko

Aleksandr Duliĉenko

Tre frue, lernante ankoraŭ en mezlernejo, mi ekpensis pri la problemoj de komuna lingvo por la tuta homaro. Mi memoras, ke hazarde mi trovis la broŝuron de N. D. Andrejev pri Esperanto “Internacia helplingvo Esperanto. (Kurta gramatiko kaj vortaro-minimumo)” (1957).

Mi tralegis ĝin kaj estis konfuzita – lingvo, kreita per homa intelekto, estas tiel rapide ellernebla! Ekde tiu tempo “eksidis” en mia kapo pensoj pri racie kreita lingvo. Kaj poste, jam kiel studento, mi tralegis la tutan literaturon pri interlingvistiko, trovitan en bibliotekoj, ellernis Esperanton kaj eĉ instruis ĝin al miaj gekursanoj...

Min precipe interesis la historio pri ideoj de internacia lingvo, libroj de Ernest Drezen pri historio de lingvo-projektado ktp. Tio okazis malproksime, “sur rando de la terglobo”, en Aŝhabad (Turkmenio), kien mi transloĝiĝis post la mezlernejo. Tie mi komencis korespondadi en Esperanto kun la tuta mondo. Nun, tralegante kopiojn de kelkaj miaj restintaj leteroj, kun hororo mi konstatas – kiel primitiva estis mia Esperanto!

Post finstudo en la Aŝhabada Universitato mi eklaboris en malgranda vilaĝo sud-oriente de la dezerto Centra Karakumo (Turkmenio). Tie mi loĝis kaj laboris kiel instruisto de turkmena lernejo dum ok jaroj. Ĝuste tie kaptis min la ideo krei historion de lingvoprojektado kiel enciklopedia informlibro. Kaj mi komencis labori malgraŭ absolute maltaŭgaj kondiĉoj por tio. Sed mi persiste skribis al ĉiuj landoj kaj petis miajn gekorespondantojn sendi al mi bezonatajn materialojn. Ĉiusempe mi veturis al Moskvo kaj laboris tie en la plej grandaj bibliotekoj, tralaborante ĉiuspecan literaturon.

Kaj jen foje, sidante en mia malproksima kaj „inter sabloj“ forgesinta vilaĝo Gara Vekil, jam preskaŭ fininta la laboron, unu dezerte varmegan majan tagon de 1972 mi ricevis leteron el la “ĉefurbo de la mondo” (superba epiteto de Moskvo en la tiama Soveta Unio!).

En la letero min surprizis la vortoj: ”Laŭ profesio mi estas lingvisto, miaj bazaj interesoj estas germanistiko, ĝenerala lingvistiko kaj interlingvistiko (cetere estus pli ĝuste komenci kun la interlingvistiko) ...”. Kun interlingvistiko tiutempe neniu komencis en Soveta Unio, tio estis senperspektiva je ideologia vidpunkto. Mi estis kortuŝita – en la mondo estas ankoraŭ alia persono, kiu decidis komenci sian sciencan vojon “de la falsa pinto”!... La persono estis tiutempe komencanta lingvisto, nun tutmonde konata interlingvisto, profesoro doktoro *Sergej Kuznecov*.

La “supra sorto” mem sendis lin al mi kiel samideanon por la laboro, per kiu tiutempe praktike ne eblis penetri en sciencan ...

Nur unuopaj sciencistoj okupiĝis krom pri siaj bazaj direktoj ankaŭ pri esperantologio kaj interlingvistiko: en Moskvo *prof E. A. Bokarev*, specialisto pri dagestanaj lingvoj, *d-ro V. P. Grigor'ev*, specialisto pri lingvistika poezio, en Estonio – akademiano *Paul Ariste*.

Pasis du monatoj post la Kuznecov-a letero, kiam mi eltiriĝis el mia dezerto, eksidis en la linia aviadilo “Aŝhabad – Moskvo” kaj post kelkaj horoj estis jam en la “ĉefurbo de la mondo”. Tuj mi telefonis al *S. Kuznecov* kaj aŭdis responde lian varmegan deziron renkonti min ajntempe kaj ajnlake ... Tian ardan interlingvistikan sojfon kontakti mi ĝis tio nenie trafis. Priskribinte sian eksterajn (staturon, harkoloron, vestaĵon, kion tenos en manoj ktp), ni facile trovis unu la alian en la trolebusa haltejo “Biblioteko de V. I. Lenin” ... La renkonto daŭras jam pli ol kvaronjarcento ... Tiam ni interparolis, ŝajne, pri ĉio ebla.

Reveninte al Kara Kumo mi entuziasme komencis fini mian libron „Mejdunarodnye vspomogatel'nye yazyki“ (‘Internaciaj helplingvoj’). Jam en marto de la sekvonta 1973-a jaro mi denove sidiĝis en aviadilon kaj transportis la manuskripton al Moskvo – pli ol 700 tajpitaj paĝoj! En la aeroporto “Domodedovo” mi prenis taksion, veturis ĝis la urbocentro, haltigis aŭton antaŭ la domo ĉe la Puŝkin-placo, eniris korten – kaj jam *S. Kuznecov* tenas en siaj manoj pezan “brikŝtonon”, mian manuskripton. Sekvonttage ni estas en la Lingvosciencia Instituto de Sovetunia Scienca Akademio, “kaptas” en koridoro de la malnova konstruaĵo la „interlingvistikan metr“(ĉefo-Red.) *Magomet Isajev*, kiu fariĝis “metr” (ĉefo-Red.) post la morto de *prof E. A. Bokarev*, kun kiu mi kaj *Kuznecov* havis densan kontakton.

M. Isajev havis demandvizaĝon “Kie vi do estis ĝis la hodiaŭa tago? Ni ĉi-tie en Moskvo tamen atendis vin!” kaj komencis nin konduki tra kabinetoj kaj finfine diris, ke neniu el la estraro de la instituto estas surloke kaj li mem ĉion faros por ke la manuskripto estu eldonota. Post liaj vortoj la libro kuŝis en Moskvo senmove ne malpli ol 10 jarojn – ĝis mi estis certa, ke neniu intencas okupiĝi pri ĝi. Mi prenis la manuskripton reen kaj strebis eldoni ĝin en Tartu kaj Tallinn. Tie la afero moviĝis, kvankam ne tre rapide. Min subtenis akademiano *Paul Ariste*. Finfine la libro aperis en la eldonejo “Valgus” en la jaro 1990. Tiel finiĝis la epopeo, daŭrinta 17 jarojn, se ne kalkuli jarojn, pasigitajn verkade de la libro.

Mi neniam partoprenis Esperanto-tendarojn, pro tio la tuta Esperanto-movado de Soveta Unio ŝajne, havis pretendojn al mi: “Ho, kial vi sidas en Tartu, ne partoprenas Esperantajn aranĝojn?!...”, skribis al mi kolere kelkaj “varmegaj” esperantistoj ... *S. Kuznecov* estis tute alia persono. Li estis ĉiama kunvenanto, lia populareco tie atingis fantastajn dimensiojn, ĉiu lia alveno en Esperanta tendaro estis taksata kiel grandega okazintaĵo, liajn Esperantajn vortojn aŭskultadis centoj da homoj, tenante spiradon ...

Mi regule veturis nur al Moskvo por preparoli kun *S. Kuznecov* sciencajn demandojn, inkluzive komunajn planojn por la estonto. Kaj tiujn ni havis nekalkuleble multajn! Foje ni eĉ komencis krei projekton de nova tutmonda lingvo, priskribis ĝiajn ĝeneralajn principojn, sed poste ne plu revenis al la plano. Nia eksterordinara deziro estis konversacii en la lingvo Volapük. Kial? Eble pro tio, ke la lingvo estis kalumniita de ĉiuj kaj ĉie; eble pro tio, ke Volapük kiel la unua ekfrontis sukcese la vojon de socialigado de la ideo pri tutmonda lingvo ...

Sergej Kuznecov estis la unua en Soveta Unio, kiu aperigis libron pri interlingvistiko. Mi trapenetris per la enciklopedia informilo „Mejdunarodnye vspomogatel'nye yazyki“ (‘Internaciaj helplingvoj’), per organizado de unuaj Tartuaj interlingvistikaj konferencoj (1987, 1990) kaj ankaŭ per eldonado de la sciencaj kajeroj “Interlinguistica Tartuensis” (ekde 1982). Tio estis nia komuna trapenetraĵo, kion oni rimarkis ne nur en Soveta Unio, sed en la tuta mondo. Tiel naskiĝis la Tartua-Moskva skolo de interlingvistiko, kies aŭtoritato validas ankaŭ nun. En Tartu mi ĉiam sentis atenton kaj subtenon de akademiano *Paul Ariste*.

Forkuras jaroj, sed mi neniam povas forgesi tempon, pasigitan en Gara Vekil en la dezerta kvieto. Mi neniam povas forgesi la unuan renkontiĝon kun *S. Kuznecov*, sen kiu, tre malfacile diri, kiel estus disvolvinta mia estonta “interlingvistika sorto”. Mi bedaŭras nur, ke *S. Kuznecov* ne sukcesis viziti min en la dezerto Kara Kumo (kvankam tre volis!), kie ni estus havintaj neforgeseblajn tagojn en la ekzotika naturo ... Ho ve, tio estis la okazo, kiam oni diras: “La sorto ...”

(Kruda traduko de Ede-Mall Puskar (Tallinn), redaktita de Madis Linnamägi/Tartu. Aperis en Cejano [Tartu] 2005, p. 62-65.)

4.3.2 Eldonaĵoj honore al la jubileulo

Honore al Aleksandr Duliĉenko aperis jena festlibro:

Kunnap, A./ Lefeld, V./ Kuznecov, S.N. (2006, Red.): Mikrojazyki, jazyki, interjazyki. Sbornik v čest' ordinarnogo professora Aleksandra Dmitrieviĉa Duliĉenko. Tartu: Universitas Tartuensis, 576 p. (ISBN 9949-11-444-6)

La sekcio pri interlingvistiko enhavas jenajn kontribuojn:

Klaus Schubert (Flensburg)

Interlinguistik und Kommunikationsorientierung.

Aleksandr S. Mel'nikov (Rostov-na-Donu)

O kul'turno znaĉimaj funkcii planovogo meždunarodnogo jazyka (na primere esperanto)

Detlev Blanke (Berlin)

Interlingvistiko en GDR.

Andreas Künzli (Bern)

Komparaj rimarkoj pri la deveno, profesio kaj motivoj de kelkaj ĉefaj planlingvaj aŭtoroj.

Enn Ernits (Tartu)

Johannes Aavik kaj planlingvoj

Sebastien Moret (Lausanne)

Akademiano A. E. Fersman, la scienco de estonto kaj esperanto.

Krome aperis jenaj du eldonaĵoj

Romanĉik, Romash (2006, Red.): Bibliografija ordinarnogo professora Aleksandra Dmitrieviĉa Duliĉenko. Tartu: Universitas Tartuensis, 285 p.

Tabula gratulatoria in honorem professori Alexandro Dulicenko. Tartu: Tartuskij universitet (Kafedra slavjanskoj filologii), 33 p. (i.a kun gratulmesaĝoj de la interlingvistoj Detlev Blanke, Enn Ernits, Sergej N. Kuznecov, Madis Linnamägi kaj Klaus Schubert).

4.3.3 Bibliografio de interlingvistikaj verkoj de Aleksandr Duliĉenko

Mallongigoj

АСЭ Ассоциация советских эсперантистов

ТГУ Тартуский государственный университет

ТУ Тартуский университет

Res. Resümee, Resumo

1968

1. Дуличенко Ал. Универсальные языки. – Комсомолец Туркменистана, Ашхабад, 1968, № 41 (3590), 6 апреля, с. 4.

2. Дуличенко Ал. Как разрешить вавилонское столпотворение. – Комсомолец Туркменистана, Ашхабад, 1968, № 48 (3597), 23 апреля, с. 3.

3. Duliĉenko A. D. Kiel estiĝos universala lingvo? – Interlingvistika informa servo, Reinbek, 1968, n-ro 3, p. 38–39.

Res.: Свадост, Э. Как возникнет всеобщий язык? – Москва, 1968. 287 с.

1969

4. Dulitschenko Al. Nova interlingvistika literaturo en Sovetunio. – Interlingvistika informa servo, Reinbek, 1969, n-ro 1, p. 13–15.

1970

5. Dulitschenko A. Universitata prelego pri interlingvistiko. – Interlingvistika informa servo, Reinbek, 1970, n-ro 3, p. 84.

1971

6. Dulichenko A. D. Interlinguistics in the USSR. – Eco-logos (Incorporating "Biophilist" Magazine and "International Language Reporter"), Denver, 1971, vol. 17, n-ro 61, p. 2, 15–16.

7. Dulichenko A. D. Rec.: R. Simeon. Enciklopedijski rječnik lingvistiĉkih naziva na 8 jezika: hrvatsko-srpski, latinski, ruski, njemaĉki, engleski, francuski, talijanski, ŝpanjolski. I–II. Zagreb: Matica hrvatska, 1969. – Interlingvistika informa servo, Reinbek, 1971, n-ro 2, p. 31–33. [Pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj terminoj en la vortaro]

1972

8. Duliĉenko A. D. E. A. Bokarev (25.2.1904–11.3.1971): Nekrologo. – Scienca revuo, Beograd, 1972, vol. 23, n-ro 4 (96), p. 113–116. [Pri interlingvistika agado de prof. E. A. Bokarev]

9. Duliĉenko A. D. Nekrologo: Svadost (Istomin) Ermar Pavloviĉ. 3.3.1971. – Interlingvistika informa servo, Reinbek, 1972, n-ro 1, p. 21. [Pri interlingvistika agado de E. Svadost]

1973

10. Duliĉenko A. D. La lingvonimiko: (Ĝiaj esenco kaj problemoj). – Scienca revuo, Beograd, 1973, vol. 24, n-ro 2/3 (100/101), p. 83–90.

1975

11. Doulitchenko A. Rec.: A. Baziev, M. Isaiev. Iazyk i natsia: (La langue et la nation). Moscou, Ed. Naouka, 1973. 247 p. – La Monda Lingvo-Problemo, den Haag, 1975, vol. 5, n-ro 15, p. 184–189. [Pri interlingvistika aspekto de la verko]

1976

12. Дуличенко А. Д. Из истории интерлингвистической мысли в России. [I]. – Проблемы интерлингвистики: Типология и эволюция международных искусственных языков / Отв. ред. М. И. Исаев. Москва: Наука, 1976, с. 114–130.

1982

13. [Дуличенко А. Д.] Предисловие редактора. – Interlinguistica Tartuensis 1: Актуальные проблемы современной интерлингвистики: Сборник в честь семидесятилетия академика П. А. Аристэ. Тарту, 1982, с. 3–5 (Ученые записки ТГУ, 613).

14. Дуличенко А. Д. Академик П. А. Аристэ и интерлингвистика. – Interlinguistica Tartuensis 1: Актуальные проблемы современной интерлингвистики: Сборник в честь семидесятилетия академика П. А. Аристэ. Тарту, 1982, с. 6–14 (Ученые записки ТГУ, 613).

Res.: Akad. P. A. Ariste kaj interlingvistiko, p. 13–14.

15. Дуличенко А. Д. Интерлингвистика. – *Interlinguistica Tartuensis 1*: Актуальные проблемы современной интерлингвистики: Сборник в честь семидесятилетия академика П. А. Аристэ. Тарту, 1982, с. 68–93 (Ученые записки ТГУ, 613).
Res.: La interlingvistiko, p. 93.

16. Dulitšenko A. Interlingvistika minevikust ja tänapäevast. – *Keel ja Kirjandus*, Tallinn, 1982, nr. 6, lk. 288–295.

1983

17. Дуличенко А. Д. Советская интерлингвистика: (Аннотированная библиография за 1946–1982 гг.) / Под ред. акад. П. Аристэ. – Тарту: ТГУ, 1983. 88 с. Тираж 500 экз.
Res.: La soveta interlingvistiko: (Prinotita bibliografio de la jaroj 1946–1982), 88 p.

18. Дуличенко А. Д. О некоторых направлениях лингвопроектирования в современной интерлингвистике. – *Interlinguistica Tartuensis 2*: Теория и история международного языка. – Тарту, 1983, с. 3–20 (Ученые записки ТГУ, 644).
Res.: Pri kelkaj ĉefaj tendencoj de lingvoprojektado en la moderna interlingvistiko, p. 20.

19. Дуличенко А. Д. Концепция международного и всеобщего языка Э. К. Дрезена: (Фрагменты истории довоенной отечественной интерлингвистики). – *Interlinguistica Tartuensis 2*: Теория и история международного языка. Тарту, 1983, с. 89–121 (Ученые записки ТГУ, 644).
Res.: La koncepto de la internacia kaj tutmonda lingvo ĉe E. K. Drezen: (Unu fragmento el historio de la antaŭmilita soveta interlingvistiko), p. 121.

20. Дуличенко А. Д. Интерлингвистический аспект категории «межнациональный язык». – *Русский язык – язык великого братства народов: Тезисы докладов и сообщений Республиканской научно-практической конференции (Ашхабад, 17–19 января 1984 года)*. Ашхабад, 1983, с. 38–39.

21. Дуличенко А. Д. Интерлингвистические издания Тартуского университета. – *Информационный бюллетень АСЭ, Москва, 1983, № 6–7 (33–34), с. 25.*

22. Duliĉenko A. D. *Interlinguistica Tartuensis II*. – Informilo por interlingvistoj. (Centro de esploroj kaj dokumentado pri mondaj lingvaj problemoj de UEA. Eld. Akademia Centro Interlingvistika), Varsovio [Warszawa], 1983, kaj. 1, p. 14–15.

1984

23. Дуличенко А. Д. Обзор важнейших интерлингвистических исследований в СССР. – *Interlinguistica Tartuensis 3*: История и современное состояние интерлингвистики. Тарту, 1984, с. 3–39 (Ученые записки ТГУ, 671).
Res.: Revuo de la plej gravaj interlingvistikaj esploroj en Soveta Unio, p. 39.

24. [Дуличенко А. Д.] Несколько слов по поводу статьи Б. Г. Колкера «Вклад русского языка в структуру эсперанто». – *Interlinguistica Tartuensis 3*: История и современное состояние интерлингвистики. Тарту, 1984, с. 107–108 (Ученые записки ТГУ, 671).

25. Duliĉenko A. D. *Interlinguistica Tartuensis III*. – Informilo por interlingvistoj, Varsovio / Warszawa, 1984, kaj. 2, p. 12.

1985

26. Дуличенко А. [К 80-летию академика Пауля Александровича Аристэ]. – *Информационный бюллетень АСЭ, Москва, 1985, № 2–3 (51–52), с. 20–21.*

1986

27. Дуличенко А. Д. К становлению интерлингвистики. – *Fenno-Ugristica: Труды по финно-угроведению 13: Paul Ariste fennougristikakoolkond ja selle sidemed.* = Финно-угроведческая школа Пауля Аристэ и ее связи. Тарту, 1986, с. 32–45 (Ученые записки ТГУ, 728).

Res.: *Zur Entstehung der Interlinguistik*, p. 44–45.

1987

28. Дуличенко А. Д. Лингвосоциокультурное движение и язык: (Об эсперантизмах в русском языке). – *Interlinguistica Tartuensis 4: Вопросы общей и частной интерлингвистики.* Тарту, 1987, с. 39–63 (Ученые записки ТГУ, 775).

Res.: *Lingvosociokultura movado kaj lingvo: (Pri esperantismoj en la rusa lingvo)*, p. 63.

